

Claude Gacond kun Michel Frésard: UEA en 1935.
La estraranoj H. Steiner kaj R. Orengo.
Radioprelego de Claude GACOND, SRI, 1985 decembro 21.

<http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo-159/Radiokasedo-159-B-992-Claude-GACOND-Michel-FRESARD-UEAen-1935-La-estranajoj-H-Steiner-kaj-R-Orengo.mp3>

Cl.- Parolas Claude Gacond kaj Michel Frésard nome de Svisa Radio Internacia.

Ni daŭrigu nian prelegserion pri la esperanto-vivo antaŭ 50 jaroj.

M.- Ni konstatis, ke en 1935 Universala Esperanto-Asocio travivis tre profundan, sed efemeran gvidŝanĝon. En somero 1934 ne reelektiĝis la svisoj Edmond Privat, Edouard Stettler kaj Hans Jakob kiel ilia samideano Andreo Cseh. Oni povas diri, ke finiĝis la ĝeneva periodo, kies karakterizo estis la volo, ke UEA restu universala organizaĵo, tio estas, ke al ĝi oni povu individue kaj rekte aliĝi, sen perado de naciaj organizaĵoj. En la Universala kongreso de Stokholmo elektiĝis tute nova kaj vere internacia estraro, kiu volis ludigi al la naciaj esperanto-societoj la rolon de peranto inter la esperantistoj kaj UEA. La prezidanto de tiu ĉi reformema estraro estas la franca eksgeneralo Louis Bastien

Cl.- Bedaŭrinde lia necedema sinteno kondukos al skismo. Ne povante atingi la deziratan statut-ŝanĝon, li starigos novan organizaĵon, kiu ricevos la nomon Internacia Esperanto-Ligo. Lin ĉirkaŭis en la estraro elektita en Stokholmo kompetentaj personecoj, kiujn prezentis la revuo ESPERANTO pere de bone dokumentitaj artikoloj, Kiujn ni komencis legi al vi. Tiel ni jam raportis pri la vivo profesia kaj esperantista de la prezidanto generalo Bastien, de la vicprezidantoj inĝeniero Isbrücker kaj bankisto Vogt, kiuj estis reciproke nederlandano kaj germano, pri la direktoro-redaktoro, la germano kaj afergvidanto Robert Kreuz, kaj pri la komitatanoj Kamaryt, Malmgren, kiuj estis reciproke ĉeĥa licea profesoro kaj sveda afergvidanto.

Ĉiam per la samaj artikoloj de la revuo ESPERANTO restas konatiĝi kun itala inĝeniero kaj aŭstra registara konsilisto, el kies aktiveco poresperanta rezultis la fondiĝo en Vieno de la Internacia Esperanto-Muzeo. Iliaj nomoj estas Rinaldo Orengo kaj Hugo Steiner.

M.- Ni turnu nian atenton unue al la raporto pri Hugo Steiner. Jen mi legas tion, kion la revuo ESPERANTO publikigis en marto 1935 pri la fondinto de la Internacia Esperanto-Muzeo:

Registara Konsilisto Hugo Steiner naskiĝis la 26 februaro 1878 en Retz (Malsupra Aŭstrio). Post akiro de matureca diplomo de la meza instruado li eniris la servon de l'tiama reĝa kaj imperiestra fervojo de Aŭstrujo-Hungarujo. Li okupis postenojn en div. partoj de la lando kaj atingis la gradon de supera inspektoro. Li definitive fiksiĝis en Vieno. Dum la mondmilito li servis en la okupaciaj regionoj en Ruslando, Galicio kaj en Rumanujo. Li daŭrigis sian servadon, post starigo de la respubliko en Aŭstrio, en la nuna konfederacia fervojaro. En 1923 li pensiĝis libervole por sin plene dediĉi al Esperanto kaj al peresperanta propagando por sia hejmlando.

Sinjoro Steiner estas esperantisto de post 1911. Dum multaj jaroj li estis en la unua vico de niaj pioniroj; post la milito li fariĝis la plej elstara esperantisto de sia hejmlando. En 1924 li fondis la organon «Aŭstria Esperantisto», kiu ĵus pligrandiĝis laŭ formato kaj enhavo. En 1925 li fariĝis ĝenerala sekretario de AEA, en 1926 prezidanto kaj ankoraŭ nuntempe estas honora kaj efektiva prezidanto de nia landa organizo. En 1927 li instigis la eldonon de la unuaj fald-prospektoj por turisma reklamo ĉe la komerca ministerio, kiu de post tiam ĉiujare

aperigis similajn presaĵojn, aranĝitajn kaj tradukitajn de Hugo Steiner. Ili ĉiam vekis viglan intereson pro sia arta aspekto. Ankaŭ la Komisiono por fremdul-trafiko en Aŭstrio plurfoje eldonis tiajn reklamilojn laŭ lia propono. Lia plej granda iniciato estis la kreo de la Internacia Esperanto Muzeo. De post 1927, S-ro Steiner laboris senhalte por la realigo de sia ideo, ĝis en 1929 li atingis la celon. La 1-an de aŭgusto okazis en ĉeesto de ĉ. 700 personoj el 35 landoj la solena malfermo en ĉeesto de la prezidanto de 1^a respubliko. Ĉi tiu mem alparolis la ĉeestantojn, informante ilin, ke la registaro nomis s-ron Steiner registara konsilisto pro liaj grandaj klopodoj pere de Esperanto.

Cl.- La Universala Kongreso en 1935 okazis en Italio, kaj unu el ĝiaj organizantoj estas la lasta UEA-estrarano, kiun ni prezenti al vi: profesoro d-ro inĝeniero Rinaldo Orengo. Jen ni citas tion, kion raportas la revuo ESPERANTO pri li:

Inĝeniero D-ro Rinaldo Orengo naskiĝis la 13.11.1895 en La Spezia (Italujo). Post lernado en klasika gimnazio, li komencis inĝenierajn studojn en la Supera Reĝa Politeknika Lernejo de Torino. En 1915 li tamen devis interrompi la universitatajn studojn pro la milito, kiun li partoprenis preskaŭ dum ĝia tuta daŭro ĉe la fronto. Li atingis dum la milito la rangon de leŭtenanto en la pionira korpuso kaj poste fariĝis kapitano de rezervo. Post la milito li daŭrigis sian studadon ĉe la universitato de Torino (Inĝeniera fakolito: politekniko) kaj estis diplomita pri mekanika inĝenierarto.

D-ro Orengo laboris en Albanio, poste en Italujo kaj Afriko. Kiel inĝeniero ĉe la Reĝa Itala Maristaro li direktis havenajn laborojn. Li funkciis ankaŭ kiel profesoro pri teknikaj fakoj en Navigacia Lernejo. Dum kelka tempo li estis asistanto ĉe la Reĝa Astrofizika Observatorio en Arcetri (apud Firenze). Esperantistiĝinte en 1919-20, li tuj montriĝis lerta kaj fervora propagandisto. Li fondis plurajn grupojn en diversaj urboj en Italujo, partoprenis la verkadon de Teknikaj Terminaroj en Esperanto, publikigis multajn artikolojn pri problemoj de la movado en Esperanto-gazetoj, tradukis plurajn literaturajn verkojn (plejparte ankoraŭ ne eldonitajn). La bone konata gvidlibro «Milano kaj Lagoj de Lombardio», eldonita de Touring Club Italiano, estas ankaŭ de li tradukita. Ne nur kiel inĝeniero, sed ankaŭ kiel esperantisto, D-ro Orengo havas grandan propagandan kaj organizan sperton. Li estis dum du jaroj vicprezidanto de la Itala Esperanto-Federacio kaj depost kvar jaroj estas ĝia Administra Direktoro. En 1932 li estis elektita Lingva-Komitatano. De longe li estas unu el la plej viglaj batalantoj por la reorganizo de UEA, en kiu li nun aktive kaj decide partoprenas. - fino de la citaĵo.

Venontan fojon ni raportos pri la neordinara Universala Kongreso, kiun inĝeniero Rinaldo Orengo kunorganizis en 1955. Ĝi havis turisman karakteron kaj migris tra Italio kaj poste sur la Mediteranea maro.

M.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Claude GAGOND kaj Michel FRESARD diras al vi: Ĝis la venonta sabato!